

Georgo Handzlik dankas al Ludoviko. Leterkesto.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1990 oktobro 04.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-21/SRI-1990-21-A-3-Claude-kaj-Andree-Gacond-Georgo-Handzlik-dankas-al-Ludoviko-kaj-Leterkesto.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Hodiaŭ ni unue prezentos novan kasedon per aŭdigo de ties unua kanzono. La vortoj, muziko kaj kantado estas de Georgo Handzlik, polo. Li kutimas ĉiam prezenti siajn kantojn kaj fakte, kiam oni aŭdas lin, li kaptas la aŭskultemon de sia aŭdantaro. Jen, mi unue legos al vi la vortojn, ĉar geaŭdantoj diris ke se ni aŭdigas muzikon, ili ŝatus antaŭe bone koni la vortojn. Jen la vortoj de tiu kanzono, kiu nomiĝas 'Ludoviko' :

„Mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko,
mi volas danki vin per ĉi tiu kant‘.

Mi volas danki vin, maljuna kuracisto,
mi volas danki vin, doktoro Eperant‘.

Pro verda koro de julio
streĉita kord‘ de koloman‘,

pro la kongres‘ en Varsovio,
pro renkontiĝo kun japan‘.

Pro la amikoj el Francio, el Germanio kaj Kanad‘,
el Itali‘ kaj Hungario, pro belulin‘ el Leningrad‘.

Pro juna negro komencanto, kortuŝa franca melodi‘,
ĉar ĉio dank‘ al esperanto,
ĉar ĉio, Majstro, dank‘ al vi.“

Do, jen, kantas Georgo Handzlik:

(muziko)

Cl.- Vi aŭdis la unuan kanzonon de la kasedo 'Sur placo de ĉiela pac' de Georgo Handzlik. Ni aŭdigos dum la venontaj elsendoj aliajn kanzonojn de tiun kasedo, kies elparolo estas tre klara - kaj tio estas ofte granda ŝanĝo kun multaj esperanto-kanzonoj.

Nia leterkesto repleniĝis. Tio donas al ni la okazon esprimi nian amikecon al tiuj, kiuj sendis aŭdraporton, salutvorton, demandon, proponon aŭ kritikon. Hodiaŭ ni esprimos unue nian dankemon al ĉiuj, kiuj sendis poŝtkarton kun esperanto-teksto. Tiujn dokumentojn ni transsendos al la arkivejo Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds por ties riĉigo.

A.- Luis BLASCO en Zaragoza, Hispanio, salutis nin per poŝtkarto, kiu reproduktas la afiŝon de la 45-sa Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Cartagena en 1985.

Cl.- Li krome sendis kvin aliajn salutmesaĝojn. Pri nia leterkesto li skribis:

A.- Mi aŭskultas tre ĝue viajn interesajn radioprogramojn. Antaŭ kelkaj minutoj mi aŭdis tre avide kaj dankeme la hodiaŭan leterkeston. Ja ĉiuj temoj de viaj elsendoj estas tre interesaj. Sed leterkesto estas la sekcio, kiu kunigas kaj plej amikigas la geaŭskultantojn.

Cl.- Gérard COULON en BUANES, Francio, sendis poŝtkarton el la regiono Landes, kiu apartenas al kolekto de "La poŝtkarto de l' amikeco."

A.- Jacques DONY en La Ricamarie, Francio, sendis kalendaron eldonitan de Kresta Stelo.

Cl.- Josef KONDOR skribis al ni el la Universala Kongreso en Habana, Kubo, per poŝtkarto kun poŝtmarko pri esperanto kaj kongresmarkoj.

A.- Karel kaj Idexa KOPECKY salutis el la dektria internacia turisma ronkontiĝo de esperantistoj en Ercmontaro, Germanio orienta, kiu disvolviĝis en majo.

Cl.- Alain LEHALLE en FEY, Francio, per poŝtkarto kun la slogano "Amikeco inter popoloj dank' al ŝako kaj esperanto" petas nin informi niajn aŭskultantojn, ke la ŝakludantoj povas koresponde ludi en la tuta mondo per Esperanta Ŝaka Ligo Internacia. Jam ekzistas pli ol 400 ludantoj en 25 landoj. Interesatoj petu al ni la adreson de Esperanta Ŝaka Ligo Internacia (EŜLI).

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND daŭrigos la venontan semajnon la malfermon de la leterkesto. Ĝis reaŭdo!